

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 14/11/2019 Kvarcentkvindekdua eldono (unua eldono 20/09/2011)



### Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)

Entute **797,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **293,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **274,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **230,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

## Gramatika serio “La Verbo en P.A.G.”. N.ro.94



Pri neado kaj jesado la jenon: La adverbo “ne” ĉiam staras senpere antaŭ la frazparto neata: Ne li aĉetis la libron + Li ne aĉetis sed pruntis la libron + Li aĉetis ne la libron sed gazeton + Li aĉetis la gazeton sed ne la libron. Se “ne” koncernas la tutan frazon, ĝi kutime staras antaŭ la verbo: Mi ne vidis la patron. Sed ĉe “esti” kaj “devi” “ne” kaj la aliaj neadaj vortoj (neniam, ktp.) staras antaŭ la predikato ĉe “esti” kaj antaŭ la infinitivo ĉe “devi”: “Li estas ne la prezidanto sed la vicprezidanto” kaj “Sciu ke vi devas ne akcepti la proponon” (“Sciu ke vi ne devas akcepti la proponon” signifas ke vi ne bezonas akcepti ĝin). Notu ankaŭ, ke ĉe alia neadovorto (ekz.”nenie”) oni ne aldonas :”ne”: “Li venis neniam se pluvigis”. Se oni aldonas “ne”, la signifo ŝanĝiĝas al pozitiva: “Ŝi ne povos ne trafi la vagonaron” = “Ŝi certe trafos ĝin”. Sed “Nek mi nek ci trafos la vagonaron”.

(daŭrigota)

**Marcel Leereveld.**



**Ĉu estas Esperantisto vivante en la mondo, pli aĝa ol Marcel?**

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

## La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm ĝis 12 tagmezo, Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagota kafo atendas vin. La 16a de novembro estos la tria sabato.



Venu, vi estos bonvenato.

**Roger Springer**



**(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)**

## Sikaŝoj en mia ĝardeno.

### LA GENIO DE ZAMENHOF.



Por eĉ pli klarigi la genion de Zamenhof ankaŭ pri “kialo kaj tialo”, mi ĉi tie donas la anglan tradukon de kelkaj frazoj liaj aŭ pri liaĵoj.

Jam dum sia vivo Zamenhof, neintence, solvis la problemon pri “kialo/tialo”: Li kreis la diraĵojn

“Kiel do mi respondus al vi pri via “kial”?”

Ĉi tie “kial” ne estas la respondo, la “tial”, *the therefore*, la tialo, *the answer*, sed “via kial”, *your why, your question*, via kialo.

Via “kial”, via kialo, ne enhavas la kaŭzon, la motivon, *your reason*.

Via kialo do ne povas esti la kaŭzo, la motivo, kiu lasta estas nur en la “tial”, en la tialo, ĉar via kialo estas via demando por ricevi la tialon, *the therefore, the reason*.

“Ĉiu tial havas sian kial”,

= *Every “therefore” has its “why” = Every reason has its question (to receive the reason).*

= Ĉiu tialo havas sian kialon. Do “tialo” estas “*reason*”, kaŭzo, motivo.

Kaj “kialo” estas “*why*”, “*question*”.

Alivorte: *Every “because of that” (= answer) has its “because of what?” (= question) = Ĉiu therefore (= kaŭzo) havas sian wherefore? (= sian demandon por ricevi la therefore, la tialon*

*kiu ankoraŭ ne estas en la demando, la kialo).*

Do: La tialo estas la respondo kun la kaŭzo aŭ la motivo,

dum: La kialo estas la demando por ricevi la motivon/kaŭzon.

“Kial” kaj “tial” ne signifas simple “demando” kaj “respondo”, sed

“speciala demando” kaj “speciala respondo”, nome:

“demando pri la kaŭzo/motivo” kaj “respondo pri la kaŭzo/motivo”.

Tiu specialeco troviĝas en la vortoparto “ial” (= “*reason*, kaŭzo, motivo), kiu “*reason*” mem troviĝas nur en la respondo, ankoraŭ ne en la demando, en “kial”, en la kialo.

Ekzakte: La “kialo” estas la demando por ricevi la ankoraŭ ne konatan kaŭzon/motivon,

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

la tialon, menciitan poste en la respondo, kune la “tialo”, kaj la sola kaŭzo” estas la “ialo”.

En la procedo okazas tri eventoj, kiuj estas:

1). Li ne venis al la kunveno. ĈI TIO ESTAS NUR LA FAKTO, SEN DEMANDO AŬ RESPONDO.  
2). Kial li ne venis al la kunveno? ĈI TIO ESTAS NUR LA DEMANDO, SEN KONI LA RESPONDON.

3). ĉar li estis malsana. ĈI TIO ESTAS LA INDIKO DE LA KAŬZO/MOTIVO, ESTANTA EN LA RESPONDO..

1) ESTAS LA FAKTO. 2) ESTAS LA DEMANDO, “KIAL”, 3) ESTAS LA INDIKO PER LA RESPONDO, “TIAL”.

1) *Is the bare fact.* 2) *Is the inquiry,* LA KIALO. 3) *Is the indication of the kaŭzo/motivo,,* LA TIALO,

Tre genia!: ĈIU “TIAL” (= TIALO) HAVAS SIAN “KIAL” (= KIALON).

Ankaŭ: ĈIU KIALO (el de “kial”) RICEVAS SIAN TIALON (el de “tial”).

**Marcel Leereveld.**

## IOM DA MURDADO .

En la Zamenhof’a Esperanto la frazo

La murdo de la krimulo.

havas du kontraŭajn signifojn:

1e. Iu murdis la krimulon kaj

2e. La krimulo murdis iun.

La esprimo “fare de”, nek la monstraĵo “far”, solvas la problemon, ĉar ambaŭ havas la du signifojn.

La nura solvo estas la prepoziciaĵoj “ate de” el “farita de”, (angle: *done by*) kaj “ante al” el “faranta al”. (angle: *doing to*).

Do se la krimulo murdis, temas pri “la murdo ate de la krimulo”, kaj se iu alia murdis la krimulon, temas pri “la murdo ante al la krimulo”.

Nur :ante al la krimulo” povas ŝanĝiĝi al “ante la krimulon”.

**Marcel Leereveld.**

## PLI DA MURDADO .

Mi tute simpatias kun Roger pri la kruelo al ĉevaloj. Ofte la krueleco ne estas por esti kruela, sed ĉar oni pensas ke tio estas bona, aŭ por la bestoj aŭ por la homoj.

Mi spertis teruran kruelaĵon kiam mi estis kvarjara kaj loĝis en malgranda vilaĝo en Nederlando. Iun matenon mi promenis el de mia domo al la loko kie troviĝis la viandbutiko. En tiu tempo, antaŭ cent jaroj, en la malurbejo la viandistoj ankoraŭ buĉis mem la kokinojn kaj la porkojn. En tiu tempo ankoraŭ estis sendanĝera por junaj infanoj promeni solaj en la vilaĝoj, kaj je la alia flanko de iu strato mi haltis por vidi kio okazis ekster la viandobutiko. Ja sur la piedvojo staris malgranda tablo kun porko firme ligita al ĝi. Evidente tio estis por mortigi kaj buĉi la porkon. La buĉisto/viandvendisto estis faronta la laboron sur la strato por ne malpurigi sian malgrandan butikon. La porko kuŝis sur sia flanko, kaj kriis pro la tre firma ligado. Tiam elvenis la buĉisto kun ujo plena de bolanta oleo, kaj komencis verŝi la bolantan oleon malrapide en la orelon de

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

la porko. Ĝia kriegado estis terura, sed la buĉisto daŭrigis sian verŝadon, ĝis fine la porko mortis. pro la terura doloro. Tre ŝokita, mi promenis hejmen por rakonti la okazon al miaj gepatroj. Sed la sono de la kriado restis en mia memoro dum la tuta vivo.

Mi poste eksciis, ke la porkbuĉistoj faras tion ĉar tiel la viando, la porkaĵo, gustas pli bone. En malnovaj tempoj ĉiuj porkoj mortigatis tiel, sed en la tempo kiam mi rigardis la eventon tiu kutimo jam estis oficiale malpermesita en Nederlando. Sed en la kamparo oni daŭrigis tion, se la homoj ne ĉirkaŭestis. Tuj poste miaj gepatroj zorgis, ke tiu kruelaĵo, ĉar kontraŭleĝa, ne plu okazu, almenaŭ en nia vilaĝo. Sed kvindek jarojn poste mi aŭdis la saman sonon, kaj dekfoje en la sama nokto. Mi tiam jam loĝis en Aŭstralio, kaj feris kun mia edzino kelkajn tagojn en malgranda hispana urbo en la nordo de Afriko. Ni loĝis en hotelo, kaj je la alia flanko de la strato estis granda konstruaĵo, la urba buĉejo. Post noktomezo komenciĝis la kriegadoj, unu post la alia. Mi volis iri el la hotelo por rigardi, kvankam mi sciis pro la speco de kriado ke tie oni traktis la porkojn sammaniere, verŝante brulantan oleon en iliajn orelojn. Sed la hotelpordo esti nemalfermeble ŝlosita, kaj mi ne plu povis dormi dum tiu nokto. Ĉar la sekvantan matenon ni devis retroiri per (senpaga) pramo al Eŭropo, mi ne povis ekzameni la buĉejon, sed plu havis la terurajn sonojn en mia memoro, dum la marvojaĝo.

Imagu ke en malnovaj tempoj tio okazadis en dekmiloj da buĉejoj en la mondo, dum dekmiloj da jaroj, dum dekmilionoj da pacemaj porkoj mortigatis tiom kruele. Kaj nur por pligustigi la viandon.

Normale la buĉejoj troviĝas ekster la urboj, sed tiu hispana kolonieto, Oran, kaj parto de Hispanujo, estas tiom malgranda ke la buĉejo devis esti en la centro de la urbo. Sed la buĉado ante al la porkoj okazis nur dum la nokto. Dum certa tempo la kriegado estas tre laŭta, sed je iu momento ĝi grade mallaŭtiĝas, ĝis la morto.

En Melburno mi neniam aŭdis tiun teruran kriadon, nur la normalan kriadon de animaloj troviĝantaj en malliberejoj, dum mi preterpasis aŭtomobile la buĉejojn en la okcidenta parto de la urbo. Sed intertempe ili transloĝiĝis, kaj nun tie troviĝas nova universitato. Sed en la medicinaj departamentoj de la universitatoj oni ankaŭ kruelas pri animaloj, ratoj kaj musoj k.t.p., eksperimentante por trovi medicinaĵojn por sanigi nin. Sed tio estas alia historio.

*Marcel Leereveld.*

## **POR ESTI EKZAKTA (SED SEN MURDO):**

La “kialo” estas la demando petanta ricevi la ankoraŭ nekonatan kaŭzon/motivon dum: La “tialo” estas la respondo donanta tiun kaŭzon/motivon.

*Marcel Leereveld.*

laŭ la Karmanjolo: “Vivu la son’ de l’ plejbon’, vivu Majstral’ geni” (la genio de la Majstro).



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

## DEKDUA NOKTO



Mi ne partoprenis en la jarkunveno de ELOA ĉi-jare, ĉar je la sama horo mi ĉeestis tiel nomatan "pop-up" konstruaĵon, kiu estas preciza kopio de la Globo Teatro en Londono. Mia filino regalis min per spektado de la Ŝekspira teatraĵo, *Dek Dua Nokto*. Ĉu vi konas la signifon de tiu esprimo, Dek Dua Nokto?

La dek dua nokto post Kristnasko (la 6a de Januaro) estas la antaŭvespero de Epifanio, kaj en pasintaj epokoj, je tiu nokto geservistoj rajtis sin vesti simile al siaj mastroj, viroj kiel virinoj kaj virinoj kiel viroj.

Do, la teatraĵo *12a Nokto* estas komedio de miskomprenoj.

Mi precipe ĝuis la sperton sidi en tiu "Globo". Oni konstruas (kaj malkonstruas) tiun "pop-up" (portempa afero) kvazaŭ ĝi estus grandega IKEA-eca afero. 3-etaĝa, 200 tunojn peza, entenanta 900 homojn. Entute kvar teatraĵoj spekteblis, kaj mi kredas, ke Perto estas la lasta ĉefurbo en Aŭstralio kiun la kompanio vizitas. Se mi ne eraras, ĝi komencis sian vivon en NovZelando. Vere tre impona.



Vera Payne

**Karaj kontribuantoj. Sen vi, AE ne povas ekzisti**

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**



*Merkredvespere mi sendas la novaĵleteron al la provlegantino por kontroli la lingvon kaj elsendas al la legantoj dum ĵaŭdo. Uzu ĝin por la reklamo de viaj semajnfinaj eventoj. Poste informu pri la sukcesoj de viaj kunvenoj en la sekvanta "Aŭstraliaj Esperantistoj" por montri ke viaj kluboj ekzistas kaj aktivas.*



## Ne nur pri ĉevaloj

Kara Roger, kial vi parolas nur pri la ĉevaloj?

Mi ne konas la bestmortigmetodojn de Aŭstralio, mi nur rajtigas min havi opinion pri la viandproduktado en Eŭropo.

Mia konkludo: Ĉiu viandproduktado, kiu ne estas ekologia aŭ almenaŭ liberaera, estas senkompata turmentado de la bestoj, ĉu kokinoj, porkoj, bov(id)oj, eĉ fiŝoj. Ĉiu, kiu aĉetas tiel produktitan viandon, subtenas tiun sistemon. Mi konfesas: Kvankam mi klopodas eviti manĝi tiajn produktojn, mi mem ne estas escepto.

Kontraŭe al vi, kiu hontas por la homaro, mi nur hontas pro la pekoj aŭ stultaĵoj, kiujn mi mem faris.

Sed mi povus la tutan tagon sidi kaj plori, kiam mi pensas pri la daŭra krueleco kaj manko de kompato, kiun niaj "gefratoj" montras en siaj agoj kaj vivmanieroj, ĉu kontraŭ homoj, ĉu kontraŭ bestoj.

Mi ne konas religion, kiu ne vokas al pacemo, homeca kaj kompatoplena konduto. Sed mi devas konstati, ke nur malmultaj aŭdas kaj sekvas tiun vokon. Amike,

**Peter Weide**



Kara Peter, mi konsentas kun vi, sed mi devas manĝi aŭ morti **Roger Springer**



## La ekonomia sistemo

Mi legis ke la ekonomia sistemo nun bezonas ke homoj aĉetu ne bezonatajn aĵojn por eviti la malkreskadon de nia landa riĉeco. Ĉu ŝparaĵo fariĝas la nova problemo? Ĉu ŝparuloj fariĝas niaj malamikoj? (fiaj homaĉoj, damnu ilin)

Do punu ilin per la ŝtelado de ilia mono per impostoj kaj malaltaj interezoj

Sed ĉu la ekonomia sistemo nun malhelpas la plej multajn de la Homaro kaj la planedon?



By hikingArtist.com

Amike **Roger Springer**



## 3zzz

La elsendo de la 11a de novembro estas dediĉita al muziko. Eblas aŭdi Floreal Martorell kiu rakontas la historion de Vinilkosmo kaj prezenton kaj kantojn de Gijom Armide, kiu ĵus publikigis sian albumon 'Nenifar', trovebla ĉe Vinilkosmo



**Franciska Toubale**

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**